

BULTENO de REU

OFICIALA INFORMILO DE RUSIA ESPERANTISTA UNIO
№ 97, Majo 2018



RUSIAJ ESPERANTO-TAGOJ – 2018 (RET-2018)

Karaj amikoj!

Programo de RET formiĝas kaj perfektiĝas ĉiutage. Kreskas kvanto de prelegantoj, artistoj kaj aktivaj partoprenantoj. Nun ni publikigas la programon de tre grava ero: Seminario pri instruado. Kiuj ĝis nun ne aliĝis, nepre aliĝu ĉe www.reu.ru!

Provizora programo:

Diskuto pri la ĉefa temo “Generacioj de Esperanto-movado” – FLAMO – I.Goncharova
Esperanto-kursoj – gvidanto V.Opletaev)
Somera Universitato – gvidanto N. Gudskov: Ronda Tablo pri la libro de A. Piperski “Konstruado de lingvoj”; T. Loskutova: skize pri E-movado en Ivanovo (ekde A.Grabovski); unuafoje en Afriko (MONA-2018 en Maroko); V. Melnikov – Literatura prelegaro k.a.
Vespera programo – respondecas R.Kudrjavceva
Kvizoj, rebusoj, konkursoj – V.Melnikov, M.Povorin

Poezia vespero kaj konkurso de Bela Lego – R.Kudrjavceva

Koncertoj – M.Povorin, E.Sokolova, A.Obrezkov, V.Jareshko

Ekskursoj – respondecas S.Smetanina

1) tra la urbo Ŝujo + Nikolo-Ŝartoma monaĥejo, vilaĝoj Gorici, Dunilovo (03.07.)

2) laŭ balmontaj lokoj (Ŝujo, Jakimanna, Gumniŝci) + programo en la muzeo (05.07)

3) mondfama urbeto Paleh – centro de produktado de lakaj miniaturaj (07.07)

Enloĝigo, kotizoj, teknikaĵoj – A.Lebedev

Krome: naĝado, sportumado (pilkoj, volanludo, tabloteniseno senpage). Lueblas remboatoj.

Funkcios Libroservo.

Kunordiganto de la programo – N.Gudskov, respondeca pri la tuto – S. Smetanina

Organiza komitato de RET

Instruista seminario de RET-2018

Karaj partoprenantoj de RET-2018 en Ŝujo!

La Organiza teamo jam estas kreanta programon de RET-2018 kaj promesas, ke ĝi kontentigos gustojn de ĉiuj frandemaj gastoj avidaj je movadaj, literaturaj, kreaĵ, turismaj temoj kaj okupoj. Ankaŭ instruista seminario estas enprogramita ĉi-foje.

Seminario estas lernejo, en kiu praktika kurso estas miksa kun diskutoj. Seminariaj okupoj celas solvi ekzistantajn problemojn, vidigi novajn ideojn, okazigi spertinterŝanĝojn, plani vojojn al perfektigo, reflekti atingitajn rezultojn ktp.

Moto de la seminario: “**Kuraĝe kaj saĝe!**”

Celgrupo: profesiaj instruistoj, amatoraj instruantoj, klubgvidantoj, interesiĝantaj kaj okupiĝantaj pri la instruado de Esperanto.

Tempo: du seminariaj kunvenoj po 1 horo 30 minutoj.

Ĉiuj RET-anoj, kiuj intencas partopreni la Instruistan seminarion, estas petataj prepari siajn ofertojn al ĝia programo, atente trastudi anticipe diskuttemojn, por esti pretaj esprimi sian opinion, trovi en siaj instruistaj “kofroj” por prezento al publiko proprajn interesajn instruistajn artifikaĵojn, metodojn, instruhelpilojn. Temojn de prelegoj kaj raportoj necesas anticipe komuniki al la Organiza teamo (Svetlana Smetanina svsmetanina@yandex.ru), ili daŭru ne pli ol 20 minutojn. Raportaĵo pri la seminario estos publikigita post RET en “Bulteno de REU”.

Programo de la seminario

La programo konsistas el tri segmentoj, kiuj ebligas traktadon de diversaj temoj el teoria kaj praktika / aplika vidpunktoj:

- 1) “Teorio kaj praktiko”;
- 2) “Diskutforumo”;
- 3) “Instruista trezorujo”.

1. Teorio kaj praktiko

(Prelegoj, raportoj, ligitaj kun lingvoinstruado kaj didaktiko kaj kun Esperanto-instruado)

1. “Tipoj de Esperanto-kursoj” (Vladimir Opletajev);


2. Lernolibro de Esperanto kaj aŭtora kurso “Mamutido Miĉjo” (Tatjana Loskutova).

2. Diskutforumo

(Libera babilejo, diskutejo, "ronda tablo" pri enlandaj instru-metodikaj problemoj)
 Proponataj temoj por la pridiskuto:
 rezultoj de la Esperanta instrusezono 2017 – 2018;
 rezultoj de la maja KER-ekzamena sesio en Moskvo;
 landa ILEI- sekcio en Rusio kaj instru-metodika komisiono de REU;
 KER-ekzameno en Rusio;
 vojoj al lertigo de Esperanto-instruantoj / instruistoj en Rusio.

3. Instruista trezorujo
 Spertintersaĝo de partoprenantoj pri:
 interesaj metodikaj eroj kaj praktikaj laborformoj por ekzercado de lernantoj pri gramatikaj reguloj kaj por aktivigo de parolkapabloj;
 originalaj instruhelpiloj;
 lingvaj kaj societaj ludoj aplikeblaj en la lecionoj de diversnivelaĵoj kursoj;
 distraĵoj en la lecionoj de Esperanto.

Kunordiganto de la seminario: Vladimir Opletajev
surborde@mail.ru



Vladimir Opletajev



Gratulojn al Andreo Grigorevskij!

La 10-an de majo havis jubileon (hobitan ☺) Andreo Grigorevskij, unu el la plej elstaraj aktivuloj de nialanda kaj internacia Esperanto-movado, brila Esperanto-instruisto kaj kluborganizanto, eksa REU-prezidanto (plurfoje!), eksa estrarano de UEA (dume sola el Rusio), volontulo ĉe UEA, iniciinto de SEJM-2, ktp., ktp.
 Ni bondeziru al Andreo fortan sanon, plurajn sukcesojn, bonan humoron, daŭran aktivadon por Esperanto kaj ĉion la plej agrablan en la vivo!
 Floru ĉiam, kiel en tiu bela maja tago, kiam vi naskiĝis! Bonfartu, kara Andreo!

Estraro de REU

Aranĝoj



Novnomita Esperanto-aranĝo en Jalta sukcesis!

Inter la 29.04 ghis la 5.05.2018 en krimea urbo Jalta estis organizita printempa E-aranĝo "Aroma Tero" ("ArTe"), dediĉita al la memoro pri Jefim Zajdman. La aranĝo estis zorge kaj detale preparita far Anĵela Belenko kaj ŝiaj helpantoj.
 La renkontiĝo celis unuigi, aktivigi, iom entuziasmigi krimeajn esperantistojn, kiujn fakte ĉiam kunigis la personeco de senlaca Jefim. Krimeo floris, sunis, estis varme, agrable kaj sentebelis proksimiĝo de somero.

Dum du unuaj tagoj en la tagordo estis renkontiĝoj kun Paŭlo Moĵaev – aktivulo, akademiano, bardo, disĉiplo de J. Zajdman. Paŭlo gvidis kelkajn interesajn programerojn: "Akademiano respondas: plej komplikaj kaj insidaj demandoj pri Esperanto", "Trejnado pri akuzativo". La ĉeestantoj plezure ekzercis, demandadis, diskutis pri gramatikaĵoj. La majstro-klaso de la akademiano pasis tre efike kaj vekis intereson de ĉiuj venintoj. Fine de sia programo Paŭlo perfekte plenumis multajn kantojn, kiujn tradukis siatempe Jefim. La koncerto kun gitarakompano ege kortuŝis la aŭskultantojn.

Ni havis ĉiutage Esperanto-kurseton, kiun partoprenis diversaĝaj kaj diversnivelaĵaj dezirantoj. La lecionoj pasis vigle, interese, la tempo kuris nerimarkeble. Krom la kleriga programo ni multe ekskursis. Perfektan ĉiĉeronadon en la Ĝardeno Voroncovskij organizis por nia grupo esperantistoj el Alupka Leo Legostajev kaj Ivan Suĥov. Ili kune rakontis kaj montris al ni unikajn arbojn kaj kreskaĵojn de tiu chi loko. Ni rampis al rokoj, fotiĝis, ĝuis florantan naturon. Interalie, ni naĝhis en la maro komence de majo! Perfekte kaj neforgeseble! Purega refreŝiga akvo, varmega suno, amataj amikoj apude! Paradizo!

Neripetebla estis nia vojaĝo al Sebastopolo, Ĥersoneso kaj unika kabo Fiolento, kien oni ankoraŭ ne gvidas turistojn. La loko estas fabela, iom for de kutimaj vojoj, sed impresiga ĝis larmoj. Ne estas finitaj konstrulaboroj en preĝeja korto kaj apude, oni ordigas la vojojn, eble baldaŭ ĉiuj turistoj ekscios tiun nomon. 900 ŝtupoj gvidas suben al la maro.

Ni vojaĝis, kiel kutime, al "Hirunda Nesto", promenis, manĝis, fotiĝis, ŝipumis.

Встреча | Клуб вольных путешественников им. Н.А.Боровика

с Ялтинским эсперанто-клубом "ТЕРО"

Презентация альманаха "Планета друзей"

5 мая
13-00

Ялтинская центральная библиотека им. А.П.Чехова
 г. Ялта ул. Морская 8

В УЕА спонсорский

Neforgeseblaj estis vesperaj programoj: koncertoj de T.Orjol (Volgogrado), V. Jareško (Sankt-Peterburgo), komuna koncerto, babilado, ŝercoj, promenoj.



La plej ĉefa kaj pinta programero de la tuta aranĝo estis renkontiĝo en la urba biblioteko je la nomo de A.P. Ĉehov. Favoran rilaton de la bibliotekaj laborantoj delonge ĝuas esperantistoj. Dum kaj antaŭ la aranĝo funkciis Esperanto-ekspozicio. La programo estis dediĉita al memoro pri Jefim Zajdman. Sonis kantoj, kiujn li tradukis dum sia vivo, ilin profesie plenumis T.Orjol kaj V. Jareško. Krom esperantistoj venis literaturistoj (poetoj, verkistoj, tradukistoj), ĉar ĝuste en ĉi aranĝo estis prezentita Almanako “En rondo de amikoj” numero 57, dediĉita al Jefim Semenoviĉ Zajdman. 42 paĝoj el 400 rakontas pri Jefim, lia vivo, agado, hobiaj, strangaĵoj liaj amikoj, lernantoj, klubanoj. Multas tre interesaj fotoj. La sekva 58-a numero entenas rakontojn de Jefim mem pri si. La kompilantino de la Almanako



V.P. Kirichenko esprimis varmajn dankojn al esperantistoj, invitis ilin kunlabori en la Almanako: verki, traduki, publikigi siajn prozaĵojn.

Alia, la plej grava evento de ĉi aranĝo jenis: la biblioteko disponigas grandan komfortan ĉambron en la unua etaĝo por organizi muzeon de Esperanto. Tio estas tre bona iniciato far jaltanoj kun subteno de la urba biblioteko. Bezonatas ne nur materialoj, da ili dume estas abunda kvanto, sed finaca helpo por aĉeti ŝrankojn, standojn, bretojn por la muzeo. Mi esperas, ke ni ĉiuj devas helpi kaj partopreni tiun gravan unikan projekton. En la proksima tempo REU-Estraro decidis, al kiu konto eblos ĝiri monon por subteni la projekton “Esperanto-muzeo en Jalta”.

Ĝenerale, malgraŭ fopaso de Jefim, kiu estis eterna motoro de Jalta agado, la aranĝo pasis tre bone, multaj krimeaj esperantistoj partoprenis la programerojn jen ĉi tie, jen tie.

Ekzemple, en la biblioteko estis pli ol 60 personoj, kune kun gastoj. Espereble, ne estingiĝos la fajro, kiun bruligis senlaca esperantisto, mondvojaĝanto kaj bardo, nia karmemora Jefim Zajdman! Lian E-torĉon portu esperantistoj de tuta bela Krimeo kaj la organizo de Esperanto-muzeo kun helpo de esperantistoj el nia vasta lando estu la plej bona memoro pri lia vivo kaj multflanka agado.

Dankon al Anĵela pro la organiza laboro, korajn salutojn al ĉiuj krimeanoj kaj multajn sukcesojn al la partoprenintoj, partoprenantoj kaj partoprenontoj de nia nobla Esperanto-agado!

Svetlana Smetanina

Pri la printempa Esperanto-renkontiĝo en Jekaterinburgo

La 26-n de majo en Jekaterinburg sukcese pasis printempa Esperanto – renkontiĝo, kiun partoprenis entute 17 esperantistoj: 16 jekaterinburganoj kaj unu nia konstanta gasto – Pavel Veselov el Tjumeno.

Ni sukcesis realigi interesan klerigan kaj kulturalan programon, kiu komenciĝis de lastaj novaĵoj en Esperanta mondo kaj informoj pri estontaj someraj Esperanto – aranĝoj, rusiaj kaj eksterlandaj. Dum tiu ĉi parto de la programo ankaŭ Lena Husanova rakontis pri la lastaj novaĵoj de la projekto “Amikumu”. Post tio sekvis la programero dediĉita al la 110-jara jubileo de UEA – Universala Esperanto-Asocio. Opiniante, ke esperantistoj devas esti bone informitaj pri nia plej granda kaj ĉefa Esperanto-organizaĵo, mi rakontis al la partoprenintoj pri la historio de la apero de UEA, iom pri ĝia strukturo kaj ĝiaj aktivecoj, pri la ĉefa organo de la asocio – revuo “Esperanto” kaj ankaŭ pri la Jarlibro kaj libroservo de UEA. Ni kune spektis fotojn kaj videojn el la 48-a Malferma Tago, kiu okazis celebre al la 110 – jariĝo de la asocio la 28-n de aprilo, ĝuste en la naskiĝtago de UEA, en Roterdamo. Estis des pli agrable fari tion, ĉar la solenan Malferman Tagon partoprenis kaj prelegis dum ĝi niaj samlandaj samideanoj, redaktoroj de la revuo “Esperanto” – Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova.

Dum nia maja renkontiĝo estis ankaŭ faritaj resumoj pri du ĉi-jare okazigitaj uralaj retaj projektoj “Fotaj el mia albumo” kaj “Transdonu bonhumoron!”, kaj mi kiel ĉefa kunordiganto de tiuj aktivaj, dankis esperantistojn, kiuj gvidis ilin kaj tiujn, kiuj aktive partoprenis la projektojn. De tiu programero ni flue transiris al la rakonto pri Raymond Schwartz, klasikulo kaj elstara humoristo de la Esperanto-literaturo. Ĉi-jare estis jam la 45-a datreveno post lia morto, sed ni omaĝis al li ne nur pro tio, sed ankaŭ tial, ke antaŭnelonge ni volonte uzis kaj citis plurajn liajn legindajn humuraĵojn dum nia lasta reta aktivajo. Kaj ĉi-foje, krom lia portreto kaj fotoj de la kovriloj de liaj libroj, estis prezentitaj faktoj de lia biografio kaj voĉlegitaj de mi kaj Aleksandra Osipova apartaj verkoj de Raymond Schwartz. Nian kulturalan programon riĉigis jekaterinburga esperantisto Sergej Kumkov, kiu plenumis kelkajn kantojn en Esperanto, akompane de la gitaro. Ĉiuj plezure kunkantis la kantojn de Bulat Okudĵava: la faman “Preĝon” kaj “Kanton pri malfermita pordo” en la bela traduko de M. Giŝpling kaj poste okazis la debuto de ankoraŭ unu nova kanto, kiu nomiĝis “Sorĉa violono” kaj kies tekston de Leo Gumiljov, Sergej tre bone tradukis mem, kio certe estas aprezinda kaj kio konstata alian bonan progreson sur la vojo de la lingvoscio.

Agrabla surprizo por ĉiuj ĉeestintoj estis aŭdi salutmesaĝon de nia amiko el Surguto – Vladimir Opletajev, kiu ne nur bondeziris al jekaterinburgaj esperantistoj, sed petis ne tre malstreĉiĝi dum la somero, sed nur ripozi por kolekti la fortojn kaj agordiĝi al la aktiva aŭtuno, pensi pri Esperanto – kursoj, pri okazigo de la vica lingvotrejnado.

La kunvenon finis kuna amika teŭmado, kiun ni komencis de la rememoroj pri iom pli ol antaŭ 40-tagoj forpasinta nia samurbanino – esperantistino Irina Kirina, ni rememoris pri ŝi, samtempe spektinte la fotojn, en kiuj ŝi estis fotita dum diversaj uralaj Esperanto-aranĝoj; ĉiam ŝi estis vivĝoja, aktiva kaj entuziasme agordita. Tiu ĉi nian kunvenon ĉeestis ankaŭ Anjo, la filino de Irina.

Kvankam la kvanto de la partoprenintoj ĉi-foje estis iom malpli ol kutime estas dum niaj aranĝoj, min certe tre ĝojigis denove vidi ĉiujn venintajn amikojn, aparte mi ĝojis renkontiĝi kun nia novulino Svetlana Ivanova, kiu venis, malgraŭ tio, ke post du tagoj ŝi devus ekzameniĝi en sia lernejo (havis Unuecan Ŝtatan Ekzamenon). Mi ankaŭ dankas nian fidelan tjumenan amikon Pavel Veselov, kiu ne nur penas ĉiam partopreni la Esperanto – renkontiĝojn en Jekaterinburgo, sed grave helpas al ni teknike aranĝi ĉion dum ili. Kiel ĉiam mi kore dankas Natalja Mansurova kaj ŝian filon Eduard, kiuj disponigas la oportunan ejon por niaj kunvenoj, kaj ĉiujn samideanojn, kiuj kunorganizis tiun ĉi belan printempan Esperanto – renkontiĝon!

Raja Kudrjavceva, Jekaterinburgo

Regiona agado

Pri novaj retaj Esperanto – aktivaĵoj en Uralo.



Dum lastaj jaroj en nia urala regiona Esperanto – agado populariĝis tiu agaddirekto kiel retaj Esperanto – aktivaĵoj. Okazis jam kelkaj retaj projektoj, kies ĝenerala celo estas aktivigi uralajn esperantistojn kaj vigligi la regionan dissendoliston. Krome, ĉiu el ili certe ankaŭ “vivis sian propran vivon” kaj havis siajn konkretajn celojn: “30 tagoj kun Zamenhofaj proverboj”, okazigita unu monaton antaŭ la Zamenhof–tago 2016, havis celon omaĝi al L. Zamenhof kaj uzi por tio lian bonegan verkon “Proverbaro Esperanta”. Oni penis, lerninte brilajn proverbojn de la Majstro, riĉigi per ili sian ĉiutagan Esperanto – paroladon. La projekto “Esperanto – 130”, okazigita en la jubilea por nia lingvo 2017-a jaro, havis celon krei kolektivon bildon fare de niaj samtempuloj pri la rolo de Esperanto en la vivo de nunaj esperantistoj el Uralo. Ankaŭ ĉi-jare okazis du novaj retaj Esperanto –

aktivaĵoj, kiuj titoliĝis “Fotoj el mia albumo” kaj “Transdonu bonhumoron” Mi ŝatas iom pli detale priskribi tiujn lastajn.

La projekto “Fotoj el mia albumo” daŭris preskaŭ dum tri monatoj kaj celis: aktivigi uralanojn per komuna kreado de Urala cifereca

fotoalbumo; kolekti arkivon de interesaj fotoj pri la esperantista movado kaj esperantistoj de Uralo; igi samregionajn esperantistojn verki komentojn, rakontojn, rememorojn pri afiŝitaj fotoj. Dum tiu periodo la projekton partoprenis 26 esperantistoj el 9 urboj, kiuj entute sendis ĉirkaŭ 150 fotojn, en la dissendolisto aperis pli ol 70 reagoj al la ricevitaj mesaĝoj kun tiuj fotoj. Tre entuziasme laboris la gvidgrupo de la projekto, kiun eniris krom mi : Jelena Uspenskaja el Jekaterinburgo, Lidija Jerofejeva el Niŝnij -Tagilo, Pavel Veselov el Tjumeno. Estas nun antaŭvidata granda laboro pri selektado de plej interesaj el ĉiuj ricevitaj fotoj, redaktado de la senditaj komentoj antaŭ ol aperigi ĉion en nia regiona paĝaro. Jam nun eblas diri, ke tiu ĉi kolekto estas tre valora kaj tre interesa, ja fakte tio estas historio de nia urala Esperanto – movado en fotoj.



Inter la partoprenintoj de la projekto estis esperantistoj de diversaj generacioj kaj, kompreneble, gejunuloj sendis belajn kolorajn ciferecajn fotojn, kiuj respegulas Esperanto-eventojn de lastaj 10 – 15 jaroj, sed esperantistoj de pli aĝa generacio rememoris eventojn de pli antaŭa, sovetia tempo, kaj tiuj fotoj estas nigra-blankaj kaj kopiitaj de iliaj paperaj originaloj, ofte ne tiom bonkvalitaj, sed ne malpli interesaj. Sube mi, kiel ekzemplon, prezentos al vi rakonton

kaj fotojn el la 80-aj jaroj de la pasinta jarcento pri tre interesa kaj memorinda tiama evento. Ilin sendis al la dissendolisto jekaterinburga esperantisto Vjačeslav Gusev.



Karaj listanoj,

Mi volas sendi al la projekto "Fotoj el mia albumo" ankoraŭ kelkajn interesajn historiajn fotojn.

Julie de la 1981-a jaro membroj de tiama Sverdlovska Esperanto-Klubo (SvEK) iniciatis tre interesan aktivadon, dediĉitan al la 70-jara jubileo de elstara milita skolto, granda patrioto, Heroo de Soveta Unio kaj urala esperantisto Nikolaj Ivanoviĉ Kuznecov. Tio estis biciklado laŭ la speciala itinero, kiu devis ligi muzeojn de Nikolaj Kuznecov en Jekaterinburgo kaj en la urbo Talica de Sverdlovska provinco, situanta pli proksime al la najbara urbo Tjumeno. Komprenoble estis planita la vizito de esperantistoj al tiuj muzeoj. Estas konate,

ke en Talica Nikolaj Kuznecov lernis en la sepklasa lernejo kaj en la vorsta teknikumo, en Jekaterinburgo li laboris en la fama uzino "Uralmaŝ". Eble multaj esperantistoj memoras, ke en la 70-80-aj jaroj de la pasinta jarcento du uralaj esperantistoj: Viktor Kloĉkov (esperantisto el Jekaterinburgo) kaj Aleksandr Kalaŝnikov (el Tjumeno) tre interesiĝis pri la vivo de la heroo kaj esploris ĝian esperantistan vivperiodon, ili trovis multajn interesajn historiajn faktojn, ligitajn kun Nikolaj Kuznecov. Ĉi tie vi povas vidi fotojn, kiuj respiegulas tiun nian bicikladon – aranĝon omaĝe al Nikolaj Kuznecov.

1) Videblas itinera buseto, kiu akompanis la partoprenintojn de la biciklado, kaj enhavis ĉion por la unua medicina helpo, laŭbezone. Sur ĝi eblas vidi la reklamŝildon pri la projekto de esperantistoj kaj itineron de la tuta bicikla marŝo. La buseton disponigis al ni gvidantoj de la jekaterinburga (tiam sverdlovska) Palaco de junularo, en kiu tiam baziĝis nia Esperanto – klubo. Dekstre de la buseto staras Viktor Kloĉkov – unu el la iniciatintoj de la projekto. Kaj virino – neesperantistino (el funkciuloj de la palaco) skribas per sia skribilo sur la reklamŝildo ruse: "Береме пример!"

2) Jen apud la itinera buseto estas nia brava grupeto de esperantistoj – biciklistoj: de dekstre maldekstren: Viktor Kloĉkov, Aleksandr Karvackij, Rita Daŭtova (Husanova), Vjačeslav Gusev, Natalija Talankina, S. Vasiljeva.



3) Tiama prezidanto de la SvEK (Sverdlovska Esperanto-klubo)

Aleksandr Karvackij konversacias kun Viktor Kuznecov, la frato de la skolto, dum nia renkontiĝo kun li kaj kuna vizito de la muzeo de Nikolaj Kuznecov en la fama uzino "Uralmaŝ" en Jekaterinburgo.

4) La montrokesto kun la libroj, per kiuj Nikolaj Kuznecov lernis Esperanton, en la muzeo dediĉita al li en la urbo Talica.



La dua reta Esperanto – aktivaĵo, kiu relative antaŭnelonge finiĝis, nomiĝis “Transdonu bonhumoron”. Ĝi estis iniciatita en la tria dekada de marto, antaŭ la internacia Tago de Rido, kaj daŭris dum la tuta aprilo. Kiel sloganon por la projekto ni prenis la vortojn de la franca klasikulo Victor Hugo: “Rido – estas suno, kiu forpelas vintron de homa vizaĝo”, ĉar la aktivaĵo celis ne nur praktikigi la lingvon. Alvokante traduki kaj sendi al la regiona dissendolisto plaĉajn ŝercajn, anekdotojn, rakonti realajn amuzajn historiojn el la vivo, ni volis ankaŭ iom vigligi kaj bonhumorigi listanojn post longa laciga vintro kaj samtempe unuigi ĉiujn en la agrabla kaj utila kunagado. Se ne konsideri min, kiel puŝan forton (ĝeneralan kunordiganton), la aktivaĵon gvidis grupo de viroj – sprituloj: Roman Jefremov (Glazovo), Sergej Kumkov kaj Aleksandr Osincev (Jekaterinburgo), Pavel Veselov (Tjumenjo). Por la projekto kontribuis entute 18 esperantistoj el 7 urboj: 10 homoj el Jekaterinburgo, 2- el Tjumenjo, 2- el Glazovo, po unu – el Tobolsko, Surguto, Niĵnij-Tagilo, Moskvo. Estis afiŝitaj en la regiona dissendolisto ĉirkaŭ 275 diversĝenraj humuraĵoj: mallongaj ŝercaj, anekdotoj, ŝercaj aforismoj kaj demandoj, amuzaj bildoj kun ŝercaj surskriboj, humuraj klasikaĵoj (poemoj kaj rakontoj), ŝercaj fotoj, intelektaj humuraĵoj, eĉ la teksto de ŝerca kanto. Preskaŭ ĉiutage dum la monato, interŝanĝante pozitive humuraĵojn, ni esperable kreis varman etoson en la dissendolisto, kiu helpis eniri en majon, kiu jam vere estas printempa monato en Uralo, kun bona humoro kaj energio por multaj indaj aferoj. Mi dankas ĉiujn, kiuj partoprenis la projekton kaj ŝatus finian rakonton per la vortoj de Charlie Chaplin (Ĉarli Ĉaplin) : “La tago sen rideto estas ja perdita tago!” Do, ni ĉiuj bonfartu, ridetu kaj ĝuu la vivon!



Mi volas aldoni (vd. en Cerbe kaj Kore #4, kiun vi ricevas kun tiu ĉi Bulteno) nur kelkaj humuraĵojn, kiuj aperis en la dissendolisto kaj kiujn mi elektis, kiel dirus la klasikulo de ŝerca Esperanto – literaturo Raymond Schwartz, “laŭ mia... ridpunkto” :)

Raja Kudrjavceva, Jekaterinburgo

Klubo de instruistoj

Pri la Esperanto-instruado

En majo finiĝas la kalendara instrusezono, kaj la Estraro de REU kolektas informojn pri kursoj de Esperanto, okazigitaj enlande en la periodo: aŭgusto 2017 – majo 2018. Estas planate prezenti resuman raporton pri la rezultoj de la Esperanto-instruado al partoprenantoj de la Instruista seminario dum RET-2018 julie en Ŝujo.

Krome en RET estos honorita plej sukcesa Esperanto-instruisto de Rusio en ĉi tiu instrusezono laŭ la kriterioj: gvidado de diversnivela Esperanto-kursoj; apogado, prizorgado kaj daŭra progresigo de kursfinintoj; diskonigo de propraj instru-metodikaj spertoj.

La statistikan tabelon jam atingis raportoj pri dudeko da diversstipaj kaj diversnivela kursoj en la urboj Moskvo, Murmansk, Omsko, Sankt-Peterburgo, Surguto, Tiĥvino, Tobolsko, Tomsko, ankaŭ pri dumarangaj kursoj, gviditaj en Poŝeĥonjo dum RET-2017 kaj en Jekaterinburgo dum la 3-a Lingvotrejnado. La Estraro de REU dankas gvidantojn de la kursoj, kiuj informas pri siaj sukcesoj kaj kiuj cetere ne ĉiuj estas membroj de REU, sed volonte kunlaboras kun la Estraro kaj estas aktivaj kaj engaĝiĝintaj lingvoperantoj.

Ni daŭre atendas raportojn de kursgvidantoj pri la instruado en pluraj aliaj urboj de Rusio kaj deziras krei ĝis junio pli-malpli kompletan datumbazon pri la kursaro en la nuna lernojaro. Petu la tabelan demandaron por raportado ĉe Vladimir Opletajev surborde@mail.ru, Svetlana Smetanina svsmetanina@yandex.ru

Ni deziras sukcesan instruon jarfinon al ĉiuj gvidantoj de Esperanto-kursoj en Rusio!

Svetlana Smetanina, Prezidanto de REU

Vladimir Opletajev, estrarano de REU

UEA informas

MESAĜO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO OKAZE DE LA MONDA TAGO POR KULTURA DIVERSECO POR DIALOGO KAJ EVOLUIGO, 21 MAJO 2018

Ĉiujare je la 21-a de majo, la komunumo de Unuiĝintaj Nacioj festas la Mondan Tagon por Kultura Diverseco por Dialogo kaj Evoluigo. Tiu festado unue okazis en la jaro 2002, sekve de aprobo fare de la Ĝenerala Konferenco de Unesko, en novembro de la antaŭa jaro, de la Universala Deklaracio pri Kultura Diverseco.

Laŭ Artikolo 1 de la Deklaracio, “Tiu diverseco estas enkorpigita en la unikeco kaj plureco de la identoj de la grupoj kaj socioj kiuj konsistigas la homaron. Kiel fonto de interŝanĝo, novigo kaj kreemo, kultura diverseco estas same necesa al la homaro kiel estas biodiverseco al la naturo. En tiu senco, ĝi estas la komuna heredaĵo de la homaro kaj rekoninda kaj asertinda favore al la nuna kaj estontaj generacioj.”

Artikolo 5 siavice atentigas, ke “Kulturaj rajtoj estas integra parto de la homaj rajtoj, kiuj estas universalaj, nedivideblaj kaj interdependaj. La florado de krea diverseco neprigas la plenan realigon de kulturaj rajtoj... Sekve, ĉiuj homoj havas la rajton esprimi sin kaj krei kaj disvastigi siajn verkojn en la lingvo, kiun ili mem elektas, precipe en sia denaska lingvo; ĉiuj personoj rajtas al altkvalitaj edukado kaj trejnado kiuj plene respektas ilian kulturan identecon; kaj ĉiuj homoj rajtas partopreni kulturan vivon kiun ili mem elektas, kaj plenumi siajn proprajn kulturajn morojn, konforme al respekto al homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj.”

Universala Esperanto-Asocio subtenas la klopodojn de Unesko kaj de Unuiĝintaj Nacioj konservi kaj fortigi lingvan diversecon, kaj samtempe serĉi vojojn por transponti tiun diversecon apoge al la homaj rajtoj kaj daŭripova evoluigo. La Asocio subtenas la sentojn

esprimitajn en Artikolo 6 de la Deklaracio: “Samtempe kun sekurigo de la libera fluo de ideoj per vortoj kaj bildoj, oni zorgu ke ĉiuj kulturoj povu esprimi sin kaj konatigi sin. Libereco de esprimo, komunikmedia pluralismo, multlingvismo, egala aliro al belarto kaj al scienca kaj teknika scio, inkluzive en cifereca formo, kaj la ebleco, ke ĉiuj kulturoj havu aliron al la iloj de esprimado kaj disvastigo, estas la garantiiloj de kultura diverseco.”

La Agadplano aprobita de la Ĝenerala Konferenco por realigo de la Deklaracio enhavas tri promesojn kiuj rilatas al lingvoj, nome:

5. *Protektion de la lingva heredaĵo de la homaro kaj subtenado de esprimo, kreo kaj disvastigo en kiel eble plej granda nombro da lingvoj.*
6. *Instigon de lingva diverseco – samtempe respektu al la denaska lingvo – je ĉiuj niveloj de edukado, ĉie kie tio eblas, kaj kuraĝigon al lernado de pluraj lingvoj ekde la plej frua aĝo.*
10. *Antaŭenigon de lingva diverseco en kiberneto kaj kuraĝigon de universala aliro tra la tutmonda reto al ĉiuj informoj en la publika sfero.*

Nia Asocio instigas siajn membrojn festi kaj apogi kulturalan diversecon, kaj utiligi la Internacian Lingvon Esperanto kiel rimedon por engaĝiĝi kun la diversaj kulturoj de la mondo en spirito de reciprokeco kaj respekto. Se la “dialogo” menciita en la titolo de la nuna Tago portu sian plenan signifon, devas nepre temi pri dudirekta komunikado kiel eble plej senpera kaj signifoplena.

La ĉi-jara festa mesaĝo pri la Tago de Audrey Azoulay, Ĝenerala Direktoro de Unesko, emfazas “la neceson protekti la diversajn formojn de kultura esprimiĝo – lingvojn, artojn, metiojn, vivstilojn – precipe tiujn de minoritataj popoloj, tiel ke ili ne forviŝiĝu fare de la normiga movado kiu akompanas tutmondiĝon.” Ŝi citas la vortojn de Mahatma Gandhi: “Mi ne deziras, ke mia domo estu murigita je ĉiuj flankoj, nek ke la fenestroj estu ŝtopitaj. Mi deziras, ke la kulturo de ĉiuj landoj estu disblovita tra mia domo kiel eble plej libere.” Pro tio, s-ino Azoulay sugestas, “kulturo ne estas heredaĵo ŝtone fiksita, sed heredaĵo vivanta kaj spiranta, malferma al influoj kaj dialogo, permesanta al ni adaptiĝi pli pace al la mondaj ŝanĝiĝoj.”

Ni gratulas Uneskon kaj Unuiĝintajn Naciojn pro iliaj klopodoj antaŭenigi kulturalan diversecon, kaj tian daŭripovan evoluigon kiu konservas tiun diversecon, kaj promesas nian aktivan subtenon al tiuj klopodoj.

Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 735, 2018-05-20

Ekzamenoj

KER-Ekzameno-2018



La 19-an de majo en Moskvo pasis la 9-a sesio de KER-ekzameno. Ĝin partoprenis 9 homojn: tri en la nivelo B1, kvar en la nivelo B2 kaj du en la nivelo C1. Tri homoj venis el aliaj urboj: el Sankt-Peterburgo, Novgorodo kaj Saransko. El la ekzamenitoj estis 7 membroj de MEA MASI kaj 5 finintoj de deverstempe pasintaj bazaj kursoj "Faru la Rondon". La loka organizanto estis MEA MASI (Irina Gonĉarova kaj Aleksandr Basov), plenumadon de KER-agendo strikte sekvis Svetlana Smetanina, kiu gvidis la



tutan proceduron. La sesion salutis la ĉeforganizanto de KER-ekzamenoj Katalin Kovaĉ (Ietere) kaj akademiano Nikolao Gudskov. Kun saluta subteno venis la plej juna C1-sukcesinto en Rusio Petro Fedosov.

Aleksandr Basov teknike organizis filmadon de la evento kaj prizorgis pli ol 10 intervjuojn.

Ni tutkore gratulas ĉiujn partoprenintojn de la KER-ekzameno pro la kuraĝo, pro la diligenta prepariĝo kaj serioza laboro dum la ekzameno! Ni kredas, ke vi ĉiuj sukcesis!



Pli detale pri la ekzameno eblas legi en la koncerna grupo <https://vk.com/ker9moskvo> kaj en grupo de MEA MASI https://vk.com/mea_masi Tie estas ankaŭ multaj fotoj.

La sekva, jam la 10-a, moskva KER-Sesio okazos post unu jaro. Prepariĝu kaj venu!

Irina Gonĉarova

Ĉiujn detalojn vi povas ekscii en: <https://edukado.net/>, KER-ekzameno.

Karaj, mi dankas ĉiujn pro la okazo de la skriba KER-sesio. Aparte mi kore dankas Irina-n pro preparo de la kandidatoj, agitado, trejnado!

Koran dankon al Al.Basov pro kolekto de kotizoj, organizo de maĝhoj, filmado! Nikolao, dankon al vi, ke vi trovis tempon kaj venis gratuli kaj subteni! Sinceran dankon al Peĉjo, kiu kuris subpluve por diri

gratulfarazeton kaj donaci bongustajn bonbonojn! Kara Aleksandro Lebedev, via vortaro venis ĝustatempe! Dankon pro la kontribuo! Ĉio pasis brile, kandidatoj laboris diligente, trankvile kaj finis labori akurate. Manĝoj abundis, la filmado sukcesis.

Kun nia bona teamo mi esperas, ke ni atingu baldaŭ la nombron 200! Nun estas 146 + hodiauaj 9 (espereble ĉiuj sukcesis!).

Mia ideo organizi skribsesiojn en aliaj urboj ne estas utopia! Ni povus tute libere fari du-tri sesiojn samtempe en Siberio, St-Peterburgo, ie en la sudo, ĉu ne?

Mi refoje dankas ĉiujn!

Svetlana Smetanina

FLAM-analizo

Ni daŭrigas priskribon de AMO-44, aŭ AMo.Ru — la seminario “Aktivula maturigo”, iniciita de UEA kaj antaŭ APERo-12 — de MEA MASI. Rakonto pri la unua labora kunveno troviĝas en la aprila numero de nia informfoliaro (MiA MASI-4/8-2018, p.). La duan labortagon de AMO komencis la trejnado “Kio estas rusia esperantistaro kaj kia estu ĝia estonto”, pasinta en la konata inter Esperanta aktivularo maniero de FLAM-analizo.

*

FLAMO: kio ĝi estas

FLAM-analizoj pritasas pritakson de difinita situacio por trovi ĝiajn pozitivajn kaj negativajn aspektojn. Tion oni faras traktante kvar kategoriojn:

Fortoj: ene de la koncerna organizaĵo

Lamaĵoj: ene de la koncerna organizaĵo

Avantaĝoj: ene de la ĉirkaŭanta socio, kie agas la organizaĵo

Minacoj: ene de la ĉirkaŭanta socio, kie agas la organizo

Do, Fortoj kaj Lamaĵoj temas pri faktoroj, kiujn la esperantistoj povos mem regi aŭ influi. Kontraste Avantaĝoj kaj Minacoj temas pri faktoroj, kiujn la esperantistoj apenaŭ povas influi aŭ ŝanĝi, sed kiujn ili nepre devas atenti kaj kompreni, ĉar ili trudas sin el la ĉirkaŭaĵo, en kiu esperantistoj devas agi.

Analizado konsistigas nur la komencan fazon — necesas plue labori cele trovi vojojn por solvoj. Oni faras tion laŭ la sekvaj temoj:

Evoluigi la Fortojn

Kuraci la Lamaĵojn

Ekspluati la Avantaĝojn

Kontraŭi (aŭ mildigi) la Minacojn.

Laŭ la komencaj literoj la solvoserĉa ekzerco nomiĝas EKEK

FLAMO: kel ĝin organizi

La laboro ĉefe okazas en grupetoj kaj celas diskutadon, tiel ke ĉiu havu paroleblon kaj la konkludoj venu el resumo de la opinioj. En ĉiu grupo estas protokolanto, kiu pretigas skriban resumon. Se abundas tempo, ĉiu grupo povos trakti ĉiujn temojn. Se tempo premas, estu kvar grupoj, ĉiu traktu nur unu el la temoj de FLAMO kaj poste — iun (eble, la paran) temon de EKEK (laŭ la komuna decido). Fine de la grupa laboro (post FLAMO kaj post EKEK) okazas kunaj sesioj — por tuj kapti la trovaĵojn.

Dum la kunaj sesioj la rezultoj estas skribitaj liste sur granda spaco, ĉiu ideo estas formulita per 6-12 vortoj. Pli detalajn konsiderojn eblas noti suplemente al la listigo kaj poste trakti. Sekvas komunaj pridiskutoj kaj kuna finredaktado de la listigo.

FLAMO dum nia AMO

21.02.2018, AMO-44_AMo.RU-1

Temo: “Kio estas rusia esperantistaro kaj kia estu ĝia estonto”

Celo: trovi vojojn por junigi kaj modernigi la movadon en Rusio.

Tagordo:

11:00-12:00 _ Parto 1. FLAM-analizo: Kio estas la nuna rusia esperantistaro.

12:00-12:15 _ Kafopaŭzo.

12:15-13:15 _ Parto 2. EKEK-solvoserĉado: Kiel plibonigi la situacion en Rusio.

13:15-13:45 _ Parto 3. Resumo de la tuto. Konkludoj. Preparo de la protokolo.

Protokolo

Gvidanto: Irina Gonĉarova (MEA MASI, estrarano de REU)

Protokolanto: Kirill Noviĉenko (Sankt-Peterburgo, EK “Kariljono”)

Ĉeestis: P. Fedosov (MEA MASI), I. Gorodeckaja (u. Novoĉerkassko), N. Gudskov (Moskvo, estrarano de REU), G. Kevorkjanc (MEA MASI), R. Kudrjavceva (u. Jekaterinburg), A. Lebedev (MEA MASI, estrarano de REU), T. Moĵnjakova (MEA MASI), S. Smetanona (Moskvo, estrarano de REU), V. Spicina (u. Volgograd), A. Zingerman (MEA MASI).

Paso de la trejnado

Irina klarigas esencon de FLAM-EKEK. Estis proponita ĉiufoje labori kun aliaj partneroj.

Startas **FLAMO**.

Estis formigitaj 2 grupoj (Fortoj kaj Lamaĵoj), unu el kiuj pritraktas fortajn trajtojn de Esperantujo en Rusio kaj la alia grupo faras la samon pri malfortaj trajtoj (= lamaĵoj).

Okazis interŝanĝo per rezultoj por aldoni opiniojn de alia grupo al la propraj.

Rezultiĝis la jeno.

Fortoj de la Rusia E-movado:

– Reprezenteco en internaciaj E-instancoj

– Ekzisto de organizita movado (REU, MEA MASI, Ural-Siberia komunumo)

- Riĉa historio de landa E-movado
- Tradiciaj aranĝoj
- Akceptado de eksterlandanoj
- Multaj spertuloj kun alta lingvonivelo
- Multaj verkemuloj
- Fortaj eldonejoj
- Sufiĉe da lerniloj
- Bonaj vortaroj, inkluzive fakaj
- Simpleco de E-lernado por rusoj
- Apero de E-paĝoj en la reto

Lamaĵoj de la Rusia E-movado:

- Troa forto de la angla lingvo
- Malbona kono pri Esperanto tra la lando
- Por neesperantistoj ne klaras avantaĝoj de Esperanto
- Manko de interesiĝantaj gejunuloj
- Pasiveco de interesiĝantoj
- Pasiveco de klubanoj, kunsumeca konduto
- Malalta konsumado de E-verkaĵoj kompare al ĝia produktado
- Foresto de kontaktoj inter kluboj
- Ege malforta regiona agado
- Manko de komunaj projektoj kaj celoj por regionoj kaj la tuta lando
- Manko de karismaj fortaj organizantoj
- Malmultaj instruistoj kaj ilia neorganiziteco
- Ne ekzistas aparta junulara Movado kaj ĝi ne emas reaperi
- Ne estas specialaj aranĝoj por gejunuloj
- Malintereso de REU al unuopuloj
- Malforta partopreno en neesperantaj aranĝoj por promocioj Eon al eksteruloj
- Malvasta uzado de amaskomunikiloj
- Manko de ruslingvaj materialoj en eldonaĵoj
- Manko de uzado de modernaj teknologioj
- Manko de financoj; ne ekzistas subvencipetado

Estis formitaj du alikonsistaj grupoj (Avantaĝoj kaj Minacoj) por pridiskutado de eksteraj faktoroj, kiujn esperantistoj ne povas ŝanĝi aŭ influi, sed devas kompreni kaj konsideri.

Avantaĝoj jenas:

- Apero de intelekta elito en junulara medio
- Pli da socia aktivado kaj junulara volontulado
- Eblo labori kun amaskomunikiloj
- Eblo uzi senpagajn ejojn
- Eblo kunagi kun aliaj nekomercaj organizaĵoj, organizi aranĝojn en infanaj organizaĵoj
- Ekzisto de minoritataj lingvoj protektindaj, kies adeptojn pli facilas interesigi pri Eo
- Grandega lando (senproblema vojaĝado tra diverseca teritorio kun abundaj vidindaĵoj)

Minacoj jenas*:

- Grandeco de la lando (kosto de vojaĝoj, distancoj)
- *- ~~Malatento al la Movado flanke de registaro~~
- *- ~~Manko de ŝtata subteno~~
- *- ~~Kutimaj E-projektoj ne estas profitdonaj~~
- Malfacila partopreno en internaciaj aranĝoj (kosto, vizoj)
- Nevolo de homoj partopreni en fortpostulaj eventoj
- Ekonomika situacio ofte postulas aldonajn perlaborojn, kio ne lasas tempon kaj forton por kromaj okupoj.
- Abundaj kromaj ŝatokupoj
- Malkresko de ĝenerala klera nivelo de junularo (transmetita el Lamaĵoj — red.)
- Dominado de la angla
- *- ~~Nekomprene de praktika uzado de E umado~~
- *- Ne estas Rusia E-urbo.

*. ~~Politika propagando kontraŭ Rusio, malhelpanta al internaciaj rilatoj inter esperantistoj~~

*Redaktante la protokolon, la gvidanto forstrekis la punktojn, kiuj ne respondas la postulon de la tasko, nome, ke esperantistoj ne povas influi aŭ ŝanĝi la situacion. Ĉiuj forstrekitaĵoj devus trafi la liston "Lamaĵoj". Sube estas metitaj la forstrekaj tezoj kun pliaj komentoj de la redaktanto.

1/ Malatento al la Movado flanke de registaro

Antaŭ ol aserti tion necesas provi allogi atenton de la registaro al E-movado (se tio vere necesas). Ĉu tiuj provoj jam estis faritaj kaj fiaskis? Kiom klare motivitaj kaj argumentitaj ili estis? Kiom oftaj kaj persistaj? Se seriozaj provoj ne estis, ne eblas scii, ĉu esperantistoj povas aŭ ne povas influi la situacion.

2/ Manko de ŝtata subteno

Kio estas tio? Ĉu iu iam petis subtenon, kiun? Ĉe kiuspecaj petoj oni ne ricevis subtenon? Se seriozaj provoj ne estis, ne eblas scii, ĉu esperantistoj povas aŭ ne influi la situacion.

3/ Kutimaj E-projektoj ne estas profitdonaj

Kio/kiu kulpas? De kio/kiu tio dependas? Grandparte — de (mal)kapabloj de mem rusiaj esperantistoj organizi profitdonajn projektojn, ĉu kutimajn, ĉu nekutimajn. En la mondo estas ekzemploj de profitdonaj E-projektoj. Do, tiu ĉi punkto devas iri al la Lamaĵoj, sed ne al nedependaj de mem esperantistoj minacoj.

4/ Nekompreno de praktika uzado de E-umado

Ĉu esperantistoj ne povas influi la situacion? Certe, povas, sed estas ellaborita nek metodo, nek strategio, nek planado, nek gvidado por fari tion. Do, tiu punkto transmetendas al la Lamaĵoj.

5/ Ne estas Rusia E-urbo

Ĉu E-urbo povas aperi sen penoj flanke de esperantistoj? Kompreneble, ne. Denove — al la Lamaĵoj, sed ne al neinflueblaj obstakloj.

6/ Politika propagando kontraŭ Rusio, malhelpanta al internaciaj rilatoj inter esperantistoj.

Politika propagando estas reciproka: same Rusio propagandas kontraŭ aliaj landoj. Ĉu tio helpas aŭ malhelpas internaciajn rilatojn inter esperantistoj dependas nure de esperantistoj mem. Politika propagando estas lamaĵo, malfacilaĵo, sed esperantistoj ene de sia komunumo, inter si mem povas kaj devas ŝanĝi la situacion. Do, ankaŭ tiu punkto — al la Lamaĵoj!

Kafopaŭzo

Startas **EKEK**. Partoprenantoj disdividiĝas je 4 grupoj.

Grupo EF: Kiel Evoluigi la Fortojn de la Rusia E-movado

- Proponi al spertuloj kun alta lingva nivelo okazigi aranĝojn kaj esti retaj konsilantoj por novuloj.
- Pri la riĉa historio de la Rusia E-movado indas okazigi prelegojn en la rusa lingvo kaj fari filmon pri la temo.
- En eldonaĵoj aperigi artikolojn en la rusa kaj en facila Esperanto por interesigi neesperantistojn kaj allogi komencantojn legi la eldonaĵojn.
- Lerniloj multas, sed ne estas metodiko. Proponi al instruistoj konkretajn metodikojn por helpi ilin instrui kaj gvidi kursojn.
- Indas instrui instruistojn uzi avantaĝojn de la rusa por instruado de Esperanto.
- Bona disvolviĝo de vortaroj estas jam plenumata kaj eblas subteni tion ne nur per mono, sed ankaŭ per spertoj de samideanoj.
- Indas inviti verkemulojn al aranĝoj kaj proksimigi ilin al simplaj partoprenantoj.
- Indas uzi modernajn aplikaĵojn. Uzi Amikumu-n por trovi hazardajn gastojn. Kapti grandajn internaciajn eventojn en Rusio, kiel futbala mondkonkurso kaj serĉi venintajn esperantistojn.

Grupo KL: Kiel Kuraci la Lamaĵojn de la Rusia E-movado

- Povus helpi komunaj grandaj programoj. Tio estas bezonata por aktivigi regionojn. Ekzemple, programo pri informado. Gravus fari programon por aperigo en blogosfero. Indas promocii komunajn projektojn per sociaj retoj.
- Indas alvoki pasivulojn, por ke ili partoprenu en programoj kaj agadoj.
- Indas trovi taŭgajn instruistojn kaj prizorgi ilian laboron, proponi renovigi kursojn kaj aktivigi malaktivajn instruistojn.

Grupo EA: Kiel Eksploati la Avantaĝojn

- Indas inviti gastojn kaj pretigi ĉiĉeronojn. Traduko de tekstoj pri turismaj vidindaĵoj. Indas iamaniere trovi kaj esplori, ĉu venos esperantistoj okaze de ĉampionato pri futbalo.
- Necesas serĉi surloke ejojn kaj lokojn kie eblas okazigi aranĝojn. Tiuj lokoj devas liveri taŭgajn kondiĉojn.
- Indas kontakti lingvajn minoritatojn en regionoj de Rusio.

Grupo KM: Kiel Kontraŭi (mildigi) la Minacojn

- Grandeco de la lando liveras ankaŭ avantaĝon. Indas fari apartajn regionajn agadojn. Tio ebligas varti lokan movadon pli efike. Eblas okazigi tutlandajn interretajn aranĝojn, por kiuj distancoj ne ekzistas.
- Malatento flanke de la ŝtato povas esti traktata ankaŭ kiel granda avantaĝo.
- Estas homoj, kiuj uzas Esperanton en komercado (Peter Balaŝ). Indas esplori ilian sperton. Multaj homoj faras diversajn ne nur pro mono.
- Studentoj havas eblojn vojaĝi al aranĝoj senpage. Estas sukcesaj ekzemploj de projektoj de MASI pri kunlaboro kun universitatoj tiurilate. Indas serĉi eblojn por vojaĝi pli malmultekoste, lernoprogramojn, uzi la Pasportan Servon, petveturadon ks.
- Pri dominado de la angla. Indas trovi avantaĝojn, kiujn Esperanto donas malsame de la angla. Indas promocii Esperanton pare kun la rusa. Necesas sciigi al homoj, ke ni ne celas anstataŭigi la anglan, Esperanto estas paralela helplingvo.

– Okazigo de la Rusia E-urbo dependas de entuziasmo. Eble per interesigo de urba administracio en turismo oni povos lanĉi ĉi-procezon.

– En ĉiu lando sendepende de politika situacio eblas trovi geamikojn.

Resumo de la tuto. Konkludoj

Resumo de la tuto estas respesulita en la Protokolo.

La partoprenintoj konkludas, ke la farita laboro estis tre utila por ĉiu el ili kaj por komenco de la vasta traktado de la problemoj en la Rusia Esperanto-Movado. Tamen ni konscias, ke la protokolitaj resumoj estas nur opinio de la partoprenintoj kaj ne povas esti gvida dokumento. Ĉiu temo bezonas plian pridiskutadon en pli vasta (aŭ en alia) konsisto, sur diversaj organizaj niveloj: en la REU-Estraro, en REU-Konferencoj, en komunaj rusiaj kunvenoj (kiel REToj), en la regionoj, en la kluboj kaj eĉ individue.

La partoprenintoj de AMo.Ru komisiis al REU-Estraro organizi la pridiskutojn laŭ la modelo de la priskribita trejnado "FLAM-EKEK" en Rusia Esperantujo.

Preparo kaj akcepto de la protokolo dum AMO ne okazis.

Preparis por publikigo Irina Gončarova

En proksima Azio

Rusaj esperantistoj en la azia parto de Rusio partoprenu en Azia Movado

REU nomumis la novan komisiiton pri rilatoj kun KAEM, kaj mi promesis helpi al li pri tiu ĉi agado. Mi opinias, ke ne nur li devas okupiĝi pri tio, sed ankaŭ aliaj rusaj esperantistoj, loĝantaj en la azia parto de Rusio. Tial mi decidis skribi publike.

Fine de la 1980-aj jaroj mi eksciis, ke sud-korea esperantisto SO Gilsu vizitis Novosibirskon. Mi speciale veturis al Novosibirsk por renkontiĝi kun li. Ni bone pasigis la tempon kaj sukcese interkonatiĝis. Li abonigis min al "Bulteno de KAEM". Kaj ekde tiu tempo dum jardekoj mi estis bone informita pri la agado de KAEM. En 1994 en Seulo (Suda Koreio) okazis Universala Kongreso (UK) de Esperanto. Mi legis en "Bulteno de KAEM", ke enkadre de la UK okazos "Azia Karavano", al kiu estas invitataj po 1 esperantisto el ĉiu azia lando. En tiu tempo s-ro SO Gilsu jam iĝis la vicprezidanto de UEA, la respondeculo pri la azia agado de UEA kaj la ĉeforganizanto de Azia Karavano. Ĉiuj membroj de Azia Karavano rajtis partopreni la UK-on en Seulo, la tuj postan ILEI-Konferencon apud Seulo, la tuj postan IJK-on en Chonan senpage. Kaj la vojaĝo kun la karavanoj tra 12 koreaj urboj kun riĉa turisma programo estis ankaŭ senpage. Ili ricevis ankaŭ sufiĉe grandan poŝmonon. Mi skribis al s-ro SO Gilsu pri mia deziro aliĝi al Karavano. Mi estis la sola deziranto el Rusio, kaj li akceptis min. Entute al la karavano aliĝis 11 personoj el 10 landoj. La organiza komitato planis akcepti pli multajn esperantistojn, sed el multaj landoj ne venis petoj. Kaj ĉiujn niajn vojaĝkostojn el niaj loĝlokoj kaj reen la organiza komitato ankaŭ pripagis.

La karavanoj en la UK kaj en la ILEI-Konferenco partoprenis kursojn de E-instruado laŭ CSEH-metodo kaj ekzameniĝis ankaŭ senpage. Mi ricevis CSEH-diplomojn de "A"- kaj "B"-gradoj kaj mezan 23 diplomon de UEA-ILEI kun rezulto "tre bone". Tiu ĉi lasta diplomo pri instruado de Esperanto restas la plej altgrada en Esperantujo ĝis nun.

Kaj post la ekzameniĝo la karavanoj devis instrui Esperanton en diversaj landoj. Mi veturis por instrui ĝin en Ĉinio kaj en Mongolio. Ankaŭ en tiuj landoj ĉiuj miaj elspezoj estis pripagitaj, kaj mi ricevis bonan salajron.

Ankaŭ en 2017 en Seulo okazis UK de Esperanto. Ĉiuj aliĝintoj al ĝi kaj ĉiuj abonantoj de revuo "Esperanto" sciis pri ĝia programo inkluzive la programon de KAEM, en kiu estis la informoj pri la 2-a "Azia Karavano" enkadre de la UK. Multaj el la azia parto de Rusio aliĝis al la UK, sed ili tute malatentis la 2-an Azian Karavanon kaj poste demandis min, kial el Rusio neniu aliĝis al ĝi? Kaj kiel sukcesis aliĝi al ĝi 15 esperantistoj el 14 aliaj aziaj landoj?

Mia respondo estas, ke rusaj esperantistoj el la azia parto de Rusio ne interesiĝas pri la azia Esperanto-Movado kaj malatentas ĝian agadon, kvankam Rusio estas la plej granda azia lando. Ial eĉ esperantistoj el Vladivostoko ne interesiĝas, kvankam aziaj esperantistoj el najbaraj landoj estas plej proksimaj al ili.

En la programo de la UK estis kelkaj programoj de la aziaj esperantistoj. Estis ankaŭ senpaga busa ekskurso kun Azia Karavano ĉirkaŭ Seulo. Sed neniu rusa esperantisto el la azia parto de Rusio venis al tiuj programoj.

Laŭ mia opinio la nova REU-komisiito pri kontaktoj kun KAEM devus konatiĝi kun la gvidantoj de KAEM unuavice. Iliaj kontaktoj estas en la Jarlibro de UEA por 2017 sur paĝo 34 en informo "Azia agado". La plej kontaktema el ili estas la sekretario de KAEM Ch. Enkhee el Mongolio. La nova REU-komisiito devus aboni "Bultenon de KAEM" kaj aliĝi al la dissendolisto de KAEM por esti bone informita. Sukcesojn!

Vladimir MININ mininvl@yahoo.com

Bulteno de KAEM N-ro 99 Aprilo 2018

Uzbekio

La Internaciaj Letertagoj

Ankaŭ en 2018 la Internaciaj Letertagoj "Assalom, Navro'z! – Saluton, Naŭruzo-2018!" bone sukcesis.

Multenombre alvenis leteroj kaj aliaj materialoj el plej diversaj partoj de la tergloblo. Pluraj reeĥoj estis publikigitaj en nialandaj paperaj aŭ kaj retaj periodaĵoj. La vortoj 'Esperanto' kaj 'esperantistoj' diversloke renkonteblas en la artikoloj.

Vidu la kunsendatajn dosierojn:

- Du artikoloj "Assalom, Naŭruzo-2018!" en niaregiona tagĵurnalo "Samarkandskij Vestnik".

- Artikolo "La festo, kiu unuigas kaj plinobligas la mondon" en la populara familia semajna gazeto "Lady" legata en ĉiuj regionoj de la lando. La du-paĝa artikolo estis anoncita ankaŭ surkovrilo de la gazeto. – Artikolo "Unuigante homojn de la planedo" en la tutlanda tagĵurnalo "Pravda Vostoka".

- Artikolo "Assalom, Naŭruzo-2018!" en la urba tagĵurnalo "Samarqand" kaj ĉi-subaj retligiloj: Kultura-Uz – landa priokultura reta revuo: http://www.kultura.uz/view_2_r_11143.html
- Pv.Uz – reta eldono de la tutlanda tagĵurnalo "Pravda Vostoka": <http://www.pv.uz/ru/obshchestvo/obedinyaya-lyudev-planety> (la artikolo aperis ankaŭ en la papera versio)
- Nuz.Uz (Novaĵoj de Uzbekio) – landa reta gazeto: <https://nuz.uz/kultura-i-iskusstvo/31332-mezhdunarodnye-dni-pisma-as-salom-navruz-2018-v-drevnem-samarkande.html>
<http://uz.utro.news/mezhdunarodnye-dni-pisma-assalom-navruz-2018-d-revnem-18032315000055.htm>
Laŭbezone, por kompreni la enhavon de retaj artikoloj, vi povas Esperantigi aŭ nacilingvigi la tekstojn, helpe de Translate.Google.Com (aŭ similaj traduksistemoj).

Anatoli Ionesov,
Enciklopedia projekto "Samarkandiana" P.O. Box 76, UZ-140100 Samarkando, Uzbekio, imps86@yahoo.com
Bulteno de KAEM N-ro 99 Aprilo 2018

Esperanto en Centra Azio

KAEM/UEA planas reaktivigi E-movadon en la landoj de Centra Azio. Tiucele oni lanĉis jam kelkajn iniciatojn, inter ceteraj – 32 E-lernadon pere de enretigita E-lernolibro en <http://www.gazetaro.org/mamutido/> (por rusparolantoj). Kial por rusparolantoj? Laŭ disvastigo de la rusa lingvo la Centran Azion eblas dividi je du grandaj zonoj. Al la unua zono apartenas Kazahio, kie pli ol 85% de la popolo scipovas la rusan lingvon, kaj al la alia – Kirgizio, Uzbekio, Taĝikio kaj Turkmenio, en kiuj la rusan lingvon scias de 20 ĝis 50% de la loĝantaro. Kazahaj geesperantistoj el la urbo Ĉimkent jam komencis traduki la supremenciitan E-lernolibron en sian nacian lingvon. Tio estas salutinda! Nun estas planata ĉeesta E-instruado de la aŭtoro de la lernolibro somere 2018, plej verŝajne ekde la fino de julio por 2 semajnoj. Se tio interesas iujn el mezaziaj gesamideanoj, tiam indus kaj endas esti pretaj: 1) kunveniĝi 10-15 personojn por E-lernado; 2) trovi konvenan lernoĉambron (kun modernaj teknikiloj – komputilo, projekciilo, ekranilo); 3) sekvi mem la kurson kaj poste daŭrigi ĝian gvidadon laŭ siaj tempaj kaj lokaj eblecoj. Pli konkretaj datoj kaj daŭro de E-kurso estos precizigotaj dum daŭro de nia korespondado. Antaŭdankon pro via reeĥo!

Tatjana Loskutova
Bulteno de KAEM N-ro 99 Aprilo 2018

Porsomera bondeziro

Antaŭsomere

Tagoj salutu je varma libero,
Alvenu bongusta vigla plezur',
Esperantistojn renkontu somero
Per brila florado de la natur'!

Verdu junige humoro kaj tero,
Donacu sin vastoj de la ĝojmar',
Esperantistojn rigardu somero
Per novaj renkontoj kun l' amikar'.

Vivu kantece serena espero
Por lume plenigi l' tempon de l' suk',
Esperantistojn favoru somero
Pri hela memoro pri RET kaj UK!

Estu amikaj etos' kaj vetero,
Kunuloj, impresoj kaj ĉielblu',
Esperantistojn brakumu somero
Per ĉio plej bona en sia flu'!

Klara Ilutoviĉ

Bulteno de REU (BdR) estas oficiala informilo de la tutrusia socia organizaĵo

"RUSIA ESPERANTISTA UNIO"

BdR atendas viajn lokajn, regionajn novaĵojn! Bonvolu sendi ilin al Nikolao Gudskov nikolao@yandeĉ.ru aŭ (kaj) Svetlana Smetanina svsmetanina@yandeĉ.ru

Estraro de Rusia Esperantista Unio

Redaktofino 29.05.2018